

Memortago de la Batalo de Okinavo



La 23an de junio 1945 la batalo de Okinavo finiĝis. Fine de la dua mondmilito en 1945 la usona armeo komencis batalon al la insularo Okinavo por fari bazon por ataki la ĉefinsularon de Japanio. La 26an de marto ĝi komencis surlandiĝi sur la insulon Kerama, kaj la 1an de aprilo ĝi komencis ataki la ĉefan insulon de Okinavo.

La japana trupo garnizonanta en Okinavo persiste rezistis por ke la japana armeo preparu sin por la okazonta batalo en la ĉefaj insuloj. Dum la postaj 3 monatoj la usona armeo bombardadis la insulon Okinavo, kion oni nomis “fera ŝtormo”, kaj poste okazis kruelaj surteraj bataloj. En la malgranda insulo la loĝantoj, ne povante fuĝi, estis envolvitaj en la batalojn. Ili kaŝis sin en koralaj kavernoj, sed ofte soldatoj forpelis ilin eksteren en la pluvadon de bomboj. En kelkaj lokoj okazis la grupaj sinmortigoj truditaj de japanaj soldatoj. Dume mortis kvarono de la okinavaj loĝantoj.

Poemo recitata dum la ceremonio

En la paca parko sur la monteto Mabuni okazis la ceremonio por konsoli la militmortintojn en la Okinava Batalo. En la ceremonio estas kutimo, ke lernant(in)o legas sian poemon elektitan el 1500-2000 poemoj. En tiu ĉi jaro jena poemo estis dediĉita al la militmortintoj.



Miruku Ju no Uta

(Okinava lingvo: Kanto de paca mondo)

verkita de f-ino Uehara Miharū, lernantino en la dua jaro de la mezlernejo Niŝibe en la urbo Mijako-ŝima.

12-jara.

Mi la unuan fojon vidis burĝonon de nova vivo.

Ĝus naskita nevino

kun eta brusto ŝvelinta kaj malŝvelinta

kun membroj moviĝantaj energie

kun okuloj enfermintaj laĝetojn

“Mi estas malsata!”

“Ŝanĝu vindaĵon”

vokas per siaj krioj senĉese kaj laŭte.

Hodiaŭ, kiam mi povas teni tiujn kriojn en miaj manoj,
estas paco.

Hodiaŭ, kiam mi povas akcepti tiujn kriojn ameme,
estas paco.

Kiam mi vidas la bluan ĉielon,
tenante ŝian amindan pezon ĉe mia brusto,
mi flugas per aviadileto Cessna tra la bluo.
Mia memoro transpasas 70 jarojn.

La ĉielo certe memoras
ke patrinaj lulkantoj ĉesiĝis pro aeratakalarmoj,
ke ĝus eklumiĝintaj vivoj momente estingiĝis.

La ventoj blovantaj certe memoras
Okinavon, al kiu estis malpermesite uzi sian lingvon.
la ferodoron, kiu estis ensorbiĝinta en la korpon.

La tero suba certe memoras,
la knabojn, al kies junaj manoj estis transdonitaj pafiloj,
la lastan krion de patroj, kiuj neniam revenis hejmen.

Mi scias larmojn, kiujn multfoje forviŝis sulkiĝintaj manoj,
palpante la monumenton de militmortintoj.

Vi scias,
ke tio estis realo,
ke ekzistas malĝojo, kiu estas sinkanta profunden al la
fundo de brilaj koralaj rifoj.

Banjanaj arboj fiere starantaj
diras,

“Ne forgesu! Tio vere okazis!”

“Mallumaj kaj malsekaj
koralaj kavernoj estis
plenigitaj de malamo. Tio vere
okazis.”



“Sub la malluma ĉielo homoj fuĝis, evitante piedpremi
kadavrojn. Tio vere okazis.”

“En la sangkoloran maron estis ĵetitaj multaj vivoj kun
krioj ‘Hura!’ kaj iliaj korbatoj estis perdiĝintaj en la ondoj
kontraŭ rokoj. Tio vere okazis.”

Juniaj floroj de *gettoo* skuiĝas.
Ne forgesu,
ke ne devis ekzisti vivoj, kiuj
viktimiĝis tiamaniere.
Ne forgesu,
ke estas pli facile detrui.
Ne forgesu,
ke tial estas tre grave protekti la vivadon tre malfortan kaj
facile rompiĝeblan.
Ne forgesu,
ke ĉiuj deziris pacon.
Ne forgesu vivĝojon.
Vi estas protektataj por plu vivi.



Starante nun sur la monteto de Mabuni,
mi volas kanti,
enspirante aeron plene en mian plumon,
sentante hodiaŭan vivĝojon ĉe mia vibranta voĉkordo,
kun decida voĉo:

Mirukujo nu nauraba jo ja naore
(Venu paca mondo kaj ĉiuj vivu feliĉe.)

La pacan mondon ni mem efektivigu!
Vi, kunstarantoj,
sentu la praulan deziron,
kiu fluas en mia varma sango.
Kun vi starantaj kune

mi volas kanti al la bluega ĉielo
la kanton de konsolo.
Mi volas kanti
agorde al insulaj ventetoj
la animan kanton adresitan al la paca estonteco.

Ni ne forgesu!
Ni rakontadu la okazintaĵojn en tiuj tagoj!
Ni ne ripetu!
Ni vivu plenenergie!
Tiujn decidojn mi volas kanti.

Starante sur la monteto de Mabuni,
mi preĝas al la suno:
Mirukujo nu nauraba jo ja naore
La paca mondo certe venu!
Tiu ĉi mondo certe boniĝu!

Bastono transdonadita,
bastono transdonadota al la bela estonteco,
bastono de kara vivo de ĉiuj vivaĵoj,
nun troviĝas en ni.

Malluman pasintecon ni ne degeligu!
En tiun eraron ni ne plu ĵetu nin!
Sed ni transdonadu la ligon.


Kiuj efektivigas la pacan mondon, tiuj estas ni ĉi tie.

Cindron la registaro uzos por konstruado de militbazo

La registaro nun konstruigas la novan militbazon por Usono en la maro de Henoko, Okinavo, pretekstante, ke donante tiun novan bazon, Usono redonos la terenon de la aerodromo Futenma al Japanio. Post la dua mondmilito Okinavo estis koloniita de Usono ĝis 1972. Ĝi estis redonita al Japanio, sed ĝi daŭre estas militbaza insulo de Usono. Por Korea Milito, Vjetnama Milito, Iraka Milito kaj por ĉiuj usonaj militoj la insulo ludis gravan rolon. Nun Ĉinio kontraŭstaras kaj oni antaŭvidas krizon inter Ĉinio kaj Tajvano, tial la militbazoj en Okinavo pli kaj pli gravas por Usono.

La japana registaro kredigas al la pololanoj, ke la konstruado de la Henoko-militbazo donos grandan profiton al Okinavo kaj Japanio, sed multaj ne kredas tion kaj kontraŭbatalas la registaron. Ili scias, ke la nova milita bazo Henoko ne estas anstataŭa bazo de Futenma, sed tute alispeca, plej moderna militbazo por novaj militoj de Usono. Ili timas, ke Okinavo estos pli envolvita en la usona militstrategio kaj la loĝantoj pli suferos.

Redonplano de usonaj militbazoj



La Henoko-militbazo estas konstruata en la maro. Por tio oni ĵetas kvantegon da tero en la maron. Kaj la registaro, nekredeble, decidis preni teron el la suda Okinavo, kie okazis la bataloj. Tie multaj militmortintoj malaperis senspure, kio signifas, ke iliaj ostoj miksiĝis kun la tiea tero.

S-ro Ĉinen Ŝuuĵiroo (81-jara) loĝanta en la urbo Nanĵoo, diras, “Mi perdis du fratojn dum la batalo. Ili mortis en la bruligita kampo, tial mia patrino ne povis trovi iliajn ostojn. Ŝi kolektis ŝtonetojn anstataŭ iliaj ostoj kaj mentis ilin en la tombon.”

Por multaj homoj la tero mem estas cindroj de siaj familianoj, tial uzi la teron por konstrui novan militbazon, nome gradskalan maŝinon por mortigi homojn, ne estas permeseble.



La 23an de julio okazis kunveno por kontraŭi la planon. S-ro Guŝiken Takamacu, kiu volontule kolektas ostojn kaj restaĵojn de la batalo kaj nun malsatstrikas en la Paca Parko, parolis, “En la sudo de la insulo Okinavo ankoraŭ restas multaj ostoj. Preni teron tie kaj uzi ĝin por la konstruado de la militbazo estas kontraŭ humanismo kaj malhonorigo de la militmortintoj.”

La regantaj partioj kaj la ĉefministro jam perdis moralon por estimi mortintojn. Ili rompas la spiritan bazon de la japana kulturo.

Kronviroza pandemio kaj Okinavo

En grandaj urboj kiel Tokio kaj Osako disvasitiĝas kronviroza pandemio. Tio estas komprenebla, ĉar tie loĝas multaj homoj kaj miksiĝas, sed la pandemio furoras ankaŭ en la fora insulo Okinavo. Kial? Unu kialo estas, ke en printempo 2020 la registaro lanĉis kampanjon “Iru por turismi!” kun subvenicio kaj multaj homoj vojaĝis al Okinavo.

La alia kialo rilatas al milito, nome la viruso elfluis de la usonaj militbazoj. Komence de 2020 aperis kvantego da kronvirusaj infektitoj en Usono. Usonaj soldatoj venas al Japanio sen pasporto, sen kontrolo ĉe la kvarantenejoj, kaj rekte eniras en la usonajn bazojn. Ili libere vizitas urbojn kaj misksiĝas kun loĝantoj. Japanaj laboristoj en la bazoj infektiĝas. La japana registaro deklaras, ke ĝi severe kontrolas vojaĝantojn el eksterlando, sed ĝi ne povas tuŝi usonajn soldatojn. Ĝi ŝajne postulas informojn pri la infektiĝo, sed Usono ne respondas sincere, pretekstante la

sekreton de militaj aferoj.

Usono ne publikigis la nombron de usonaj soldatoj en Okinavo dum la pasintaj kelkaj jaroj, sed laŭ la informo de 2011 la nombro de la usonanoj en la militbazoj en Okinavo estis 47300 (soldatoj 25843, laboristoj 1994 kaj



iliaj familianoj 19463), kaj tio estis 70% el la usonanoj en la tuta militbazaro en Japanio. Tiuj homoj libere agas en Okinavo, do kial ne disvastiĝas la pandemio pli

multe ol en aliaj gubernioj? Okinavo dependas de turismo, tial la kronviruso donas pli da bato al Okinavo ol al aliaj gubernioj. Jam pli ol 70 jaroj pasis post la fino de la milito, sed Okinavo estas ankoraŭ viktimo de la milito.